



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 118 (1/2022) ♦ 31-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org interlingvistiko.net
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Bonvenon 3

Artikoloj 4

Brian Kaneen: grava donacinto al Esperantic Studies Foundation	4
Ludecigo de lingvolernado: LinguaPolis Esperanto	6
La historio de la Premio Vidyasagar	10
Jarfina ESF-ĝisdatigo 2021	12

Bulteno 14

Ni prezentas la Bultenon	14
Retinario en Mazandarano	14
Serĉata: Tradukisto de historia studo	14
Un siècle d'espérantisme ouvrier	15
Gesellschaft für Interlinguistik 2021	15
François Grin ĉe Svisa Romanda Radio	15
Ilona Koutny prelegos dum BET-56	15
La tradukado, Esperanto kaj la lingvopolitiko	16
Kiu estis Atanasov?	16
Efiko de interkulturaj edukaj interŝanĝoj	16
Konstrui komunumon per gastamo	17
Reguligi la regulan	17
Lingva justeco ĉe IKIKO	18
Avo Grabowski	18

Esperanto-historio en Katalunio	18
Registritaj IKIKO-sesioj	19
Esperanto? Kiu lingvo estas tiu?	20
Reguloj kaj motivigoj – simpozio	20
Abibifahodie! Lingvo, konscio kaj malkoloniigo	20

Stipendioj de ESF 21

BONVENON

Ekde ĉi tiu numero, la artikoloj en *Informilo por Interlingvistoj* ĝenerale aperos pli frue en la blogo [ESF Connected](#). Tio estas aparte grava ŝanĝo rilate al niaj mallongaj anoncoj pri venontaj eventoj kaj projektoj.

Ni rimarkis (kaj bedaŭris), ke pro la trimonata ritmo de *IpI* antaŭaj numeroj kelkfoje donis informojn preskaŭ tro malfrue por ebligi efektivan partoprenon aŭ kontribuon. Tiaj anoncoj do nun aperos unue en sia propra sekcio de la blogo, nomita la Bulteno, kiun vi trovos en la dekstra kolumno de la bloga ĉefpaĝo.

Abonantoj al la blogo ricevas mallongan retmesaĝon, kutime unufoje en du aŭ tri semajnoj. Tiu mesaĝo sciigas, ke ĵus aperis nova ĉefa artikolo, kaj prezentas ligilojn al ĉiuj intertempaj bultenaj anoncetoj. Ni ankaŭ strebas pepi la plejmulton da bulteneroj per la Twitter-konto [@esfacademic](#), kaj la kompleta historio estas explorebla en [dediĉita paĝo](#).

La nuna numero de *IpI* arkivigas pli-malpli ĉion, kio aperis en la blogo en oktobro, novembro kaj decembro 2021. Multan dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis!

Se vi deziras diskonigi eventon, eldonaĵon aŭ projekton, kiu iel rilatas al la laboro de Esperantic Studies Foundation, bonvolu sendi koncizajn informojn (eventuale kun ligilo al la plenaj detaloj) al ipi@esperantic.org aŭ contact@esfconnect.org.

Sukceson al ĉiuj niaj legantoj en 2022!

Simon Davies

Brian Kaneen: grava donacinto al Esperantic Studies Foundation

Wally du Temple

<https://esfconnected.org/2021/10/19/brian-kaneen-donacinto/>



Esperantic Studies Foundation (ESF) subtenas larĝan gamon de interlingvaj esploraj kaj edukaj iniciatoj tra la mondo. Esploristoj kaj edukistoj, kiuj serĉas subtenon por interlingvaj projektoj, estas instigataj trarigardi la retejon por lerni ĉu ESF povas oferti konsiladon kaj/aŭ financan subtenon.

La investaĵaro de ESF, kiu generas la rimedojn por financi projektojn, ŝuldas multon al la malavareco de tri ĉefaj donacintoj, homoj kiel vi, kiuj subtenas lingvajn rajtojn: Cathy Schulze, Bill Schulze, Brian Kaneen kaj multaj aliaj. Jen kelkaj el miaj memoroj pri Brian Kaneen, kaj mia sincera dankesprimio.

Brian naskiĝis en Manksinsulo, kie la manksa lingvo malfortiĝis de post la apero de amasa angla turismo en la 19-a jarcento. Ĉe la pinto de turismo komence de la 20-a jarcento, pli ol 600 000 britoj vizitis la insulon ĉiujare, kiam ĝi havis lokan loĝantaron de proksimume 50 000. Plejparte, la sola maniero sukcesi estis paroli la anglan. La manksa lingvo asociiĝis kun nescio kaj malriĉeco dum la angla donis vojon al pli bona vivo. Brian, familio kaj amikoj, bedaŭris la konstantan malkreskon en la uzo de la manksa lingvo kiam li eksciis pri Esperanto en 1950. Brian tuj konsideris ke Esperanto estas nova speco de lingvo, kiel evolua plibonigo en tutmondaj komunikadoj, kiel neŭtrala internacia lingvo, planita kaj kreita intence por defendi kaj protekti minoritatajn lingvojn, vera pontolingvo de komunikado inter etnoj.

Brian Kaneen ne havis la okazon paroli Esperanton ĝis lia brita militservo en Germanio. Enmigrinte al Kanado, li studis en Universitato McGill kaj poste doktoriĝis en la Universitato Cornell en Ithaca (Novjorko), kie li fariĝis aktiva membro en la loka Esperanto-klubo. Ekde 1965, Brian Kaneen loĝis en Vankuvero, kie li servis Vankuveran Esperanto-Societon unue kiel sekretario kaj poste kiel delonga prezidanto. Kiel preleganto en Universitato Simon Fraser en Burnaby, Brian organizis kaj instruis multajn Esperanto-kursojn, precipe en la jaroj antaŭ la 69-a Universala Kongreso de Esperanto, en kies Loka Kongresa Komitato li servis kiel sekretario kaj vicprezidanto. Li servis en la estraro de Kanada Esperanto-Asocio tri fojojn, kun la postenoj de redaktoro de gazeto nomata *Lumo*, vicprezidanto (1999) kaj prezidanto (2000-03). Brian delonge estis UEA-delegito kaj lingva delegito en Vankuvero. Li estis elektita Honora Membro de KEA en 1997. Brian Kaneen mortis en 2012. Pli ol duonan milionon da kanadaj dolaroj li heredigis al Esperantic Studies Foundation. Li ankaŭ testamentis egalan sumon al “Vannin Culture”, manksa reto dediĉita al la gaela lingvo de Manksinsulo por krei stipendiojn por manksaj junuloj, kiuj deziras studi keltajn lingvojn.

Ĉiu, kiu konatiĝis kun Brian, rapide sciis pri lia sinteno rilate al etnaj lingvoj, ke la uzo de la gepatra lingvo estas grava homa rajto. Li ofte rimarkis, ke la malobservo de ĉi tiu rajto gvidas al komunumaj konfliktoj, kiel tro evidentis en multaj etnaj konfliktoj en Eŭropo, Afriko kaj Azio. Ne mirinde, ke Brian plene subtenis la ĉefcelon de ESF “labori por antaŭenigi la komprenon kaj praktikon de lingva justeco en multkultura mondo”.

Kiel lingva profesoro, Brian sciis, ke lingva diskriminacio historie havas dokumentitan tragedion de konflikto, kiu poste generis historion de specifaj lingvorajtoj donitaj al difinitaj minoritataj komunumoj en Eŭropo. La Pac-Traktato de Vestfalia, la Fina Akto de la Viena Kongreso kaj la Minoritataj Traktatoj de la Ligo de Nacioj dum la intermilita periodo en la unua duono de la dudeka jarcento ĉiuj inkluzivis leĝajn kondiĉojn por specifaj grup-bazitaj rajtoj en ŝlosilaj kampoj rilataj al lingvouzo, kiel kulturaj institucioj, edukado kaj komunikado ene de publikaj servoj. Brian rimarkis, ke post 1945 la nova internacia sistemo donis pli da atento al individuaj homaj rajtoj, ol al lingvorajtoj de grupoj.

Brian rimarkis, ke post la dua mondmilito la rapida disvastiĝo de la angla tra la mondo fariĝis minaco por aliaj lingvoj, precipe tiuj de malpli konataj komunumoj kaj minoritataj lingvoj, kiuj estas riĉaj spegulbildoj de specifaj kulturoj valoroj, kiuj portas multajn lingvajn, historiajn, sociajn kaj antropologiajn informojn. Li opiniis, ke ĉar ĉi tiuj lingvoj estas konstante minacataj de marĝenigo kaj estingo, ĉiu provo protekti kaj revigligi ilin kontribuos al konservado de lingva diverseco kaj kultura scio por estontaj generacioj.

Mi memoras, ke Brian citis vortojn de Ilya Prigogine, kiu gajnis la Nobel-premion pri scienco en 1977 pro teorio priskribanta transformojn, ne nur en la fizikaj sciencoj, sed ankaŭ en la socio – la rolo de streso kaj perturboj, kiuj povas puŝi nin al nova, pli alta nivelo. Prigogine diris: “Ni estas en ekscita momento en la historio, eble en turnopunkto.” Bedaŭrinde ni ankoraŭ atendas. Se mia amiko Brian estus ankoraŭ vivanta, mi ne dubas, ke li konsiderus la nuntempajn krizojn pri mondovarmiĝo, pri la defioj de tutmonda sano en tempo de pandemio,

pri la detruo de la natura medio, ankaŭ malriĉeco kaj malsatego kiel sufiĉajn stresojn kaj perturbojn por kaŭzi turnopunkton kaj paradigman salton.

Brian legis la faman libron de Thomas Kuhn el 1962, *La strukturo de sciencaj revolucioj*. Li diris, ke la ideoj de Kuhn estas helpemaj, ne nur ĉar ili helpas nin kompreni kiel naskiĝas nova perspektivo, sed ankaŭ kiel kaj kial. Iusence Brian havis stoikan sintenon, ke turnopunkto al paradigma saltoŝanĝo al lingva egaleco finfine sukcesos. Tamen, li ne pretis simple atendi, kaj dum jardekoj li forte argumentis por antaŭenigi homajn rajtojn universale. Brian estis forta aganto por la realigo de la latentaj potencialoj de la Unuiĝintaj Nacioj (U.N.).

Kiam Brian mortis kaj heredigis duonmilion da dolaroj al ESF kaj la egalan sumon por la instruo de la manksa lingvo, min surprizis nur la grandeco de la testamentaĵoj. Mi omaĝas al Brian Kaneen. Dankon, kara amiko.

Wallace G. du Temple, iama lernejestro en Nunavuto, Kanado, estas la direktoro de ESF respondeca pri administrado de sia investaĵaro. Li decidis dividi sian estimon pri unu grava donacinto, nome, Brian Kaneen.

Ludecigo de lingvolernado: LinguaPolis Esperanto

Vita Kogan kaj Stas Kapustin

<https://esfconnected.org/2021/11/22/ludecigo-linguapolis/>



Ludecigo – la uzado de ludpensado kaj ludmetodoj por edukaj celoj – akceliĝas. Pluraj universitat-nivelaj ĵurnaloj dediĉas sin al tiu ekscita nova tendenco: *International Journal of Game-based Learning*, *Serious Games* kaj *Electronic Journal of e-Learning*, inter aliaj. Okazos ankaŭ jar konferenco, la **Eŭropa Konferenco pri Ludbazita Lernado**, en 2022 en Lisbono (Portugallio). Lingvoedukistoj antaŭ longe rekonis la valoron de ludado: pro motivado, pliboniga komento,

kunlaborado, altkvalita partoprenado kaj malmulte da nervozeco, ludoj estas perfekta ilo por lingvoakirado.

Kiel multaj lingvoinstruistoj, mi uzis plurajn specojn de tabulludoj kaj komputilaj ludoj en mia klasĉambro – ludoj specife destinitaj por lingvolernantoj (multaj atentindaj ekzemploj troviĝas en *Games for Language Learning* de Andrew Wright, David Betteridge kaj Michael Buckby) kaj ankaŭ tiuj, kiuj celas denaskajn parolantojn (*Monopolo*, *Skrablo*, *Bingo*, ktp). Sed ĉiam mankis io – ludo, kiu aldonus realan kuntekston en la klasĉambro kaj motivus studentojn paroli. Kvankam ekzistas multaj ekscitaj tabulludoj, kie ludantoj esploras fantaziajn mondojn kaj solvas kreemigajn problemojn, mi volis transporti miajn studentojn al *real*a urbo, kie ili povus viziti lokajn vidindaĵojn kaj sperti la historion kaj kulturon.

Tiel estiĝis *LinguaPolis*. Unue, amiko kaj mirinda bildisto Stas Kapustin helpis min kunmeti *LinguaPolis Novjorko*, kartludon, konstruitan sur la ideo esplori la urbon Novjorko kaj ekzerci sin pri la konversacia angla lingvo. La ludantoj, alveninte ĉe la Internacia Flughaveno John F Kennedy, vojaĝas tra Novjorko, kie ili renkontas ĉiutagajn situaciojn: butikumi, lui aŭton kaj eliri socie. La ludo konsistas el du kartaroj: la lokoj – la plej konataj allogaĵoj kaj oftaj publikaj ejoj en la urbo – kaj la eventoj, kiuj gvidas al la aventuroj de la ludantoj. Ekzemple, ŝtelita monujo povas gvidi al konversacio kun policano. Venkas tiu ludanto, kiu plej bone komunikas kaj atingas sian hotelon pli frue ol la aliaj ludantoj.

La ludo fariĝis komerca sukceso kaj ni sekve eldonis *LinguaPolis Moskvo* por ekzercado pri la konversacia rusa lingvo.



En la skatolo (LinguaPolis Moskvo): lokokartoj, eventokartoj, mono, ĵetkubo

Eĉ pli ekscite: la ludoj komencis amasigi ĉirkaŭ si komunumon de praktikantoj, tiel ke ludvesperaj kunvenoj kaj *LinguaPolis*-kluboj ekaperis tra la mondo. La plano estis malrapide konstrui novajn ludojn pri novaj lingvoj: la franca, la hispana, la germana...

Je tiu paŝo ni komencis ricevi retroŝtaĵojn de homoj petantaj, ke ni kreu ludon pri malpli uzataj lingvoj aŭ la lingvoj, kiuj formortas kaj havas tre malmulte da parolantoj. Nova sociolingvistika graveco, kiun *LinguaPolis* povus gajni, inspiris nin serĉi novan projekton for de la konataj vojoj. Anstataŭ okupiĝi pri la fama triopo franca-hispana-germana, ni serĉis lingvon, kiu celas unuigi ĉiujn naciojn kaj tamen restas sur neŭtrala fundamento politika kaj kultura. Tiel estiĝis *LinguaPolis Esperanto*. Dank' al la subvencioj Interlingvistika Subteno de ESF, ni povis testi novan ludon, dum ni konstruis ĝin, kaj fari rilatajn esplorojn pri nervozeco ĉe parolado de fremda lingvo.

Kio estas en la ludo?

La ludotabulo de *LinguaPolis Esperanto* konsistas el diversaj lokoj tra Esperantopolo, imagan transnacion urbon, kiu kunligas elstarajn monumentojn kaj kulturajn objektojn de la mondo (ekz. la Eĵfelturon, aŭ la Gigantan Budhon de Leŝano en Ĉinio). Dum la ludantoj vojaĝas de la flughaveno al la hotelo, ili spertas Esperanton en diversaj realecaj parol-situacioj: manĝi en restoracio, orientiĝi pri publikaj transportiloj, kaj kundividi sian vivhistorion kun amikema taksisto. La sola modo atingi la finan celon estas komuniki efike (en Esperanto!) kaj atenti sian buĝeton.

Kial ludi?

Ne facilas paroli fremdan lingvon, eĉ se oni ĝin bone scipovas. Multaj lingvolernantoj evitas paroli publike, kaj, rezulte, malofte plibonigas siajn lingvokapablojn krom pri legado kaj skribado. *LinguaPolis Esperanto* kreas sekuran, amuzan, sed realecan medion, kie lernantoj povas laŭgrade pretigi sin por paroli Esperanton.

► Parolu veran lingvon!

Anstataŭ ekzerci pri abstraktaj sensignifaj situacioj kaj enkapigi listojn de senrilataj vortoj, la ludo instigas paroli pri aferoj, kiuj efektive okazas en la ĉiutaga vivo: butikumado, veturado, eliri socie, voki taksion, ktp.

► Ekzerciĝu kaj perfektigiĝu!

Antaŭprovoj de simplaj ĉiutagaj konversacioj per *LinguaPolis* multe plifaciligas paroli en la vera vivo. Tiel ni solvas parol-nervozecon pri lingvobariĵoj. Se vi sukcesos transvivi medicinan dramon en *LinguaPolis Esperanto* (en unu el niaj ludoscenoj), prezenti vin en la vera vivo estos facilege.

► Kunlaboru teame!

La ludo implicas almenaŭ du ludantojn, kaj tial ĉiu povas lerni ion novan de alia ludanto kaj reciproke kundividi siajn sciojn. Instruado fare de kunlernantoj povas esti potenca ilo por lingvolernado.

► Esplori Esperantopolon!

“Vizitante” Esperantopolon, la ludantoj ekriatas al parolantoj de aliaj lingvoj, ekkonas diversajn kulturojn kaj tradiciojn, kaj fariĝas vere kosmopolitaj.



Ludado de LinguaPolis Novjorko (kun aŭ sen instruisto)

Ĉiuj materialoj kreitaj en tiu projekto (la presita-ludota PDF de la ludo, la cifereca versio ludebla en Google Jamboard, la sonregistraĵoj en Esperanto, ktp) estos disponeblaj en nia paĝo [LinguaPolis Esperanto](#), kie ni ankaŭ invitas volontulojn kontribui al la projekto.

LinguaPolis Esperanto estas pli ol nur ludo. Bazita en Universitata Kolegio de Londono (Britujo), *LinguaPolis* estas esplorprojekto, kiu ekzamenas la rilatojn inter eduka ludecigo kaj nervozeco ĉe parolado de fremda lingvo. Ni bonvenigas eventualajn partoprenantojn en niaj lingvosciencaj eksperimentoj, kie ni ludas en fremdaj lingvoj kaj kundividas niajn pensojn prie.

La timo paroli novan lingvon estas unu el la plej oftaj kialoj, ke lingvolernantoj malrapide progresas. Ludecigo proponas solvojn por mildigi parol-nervozecon kaj plibonigi lingvokapablojn rapide. La pozitivaj emocioj, kiujn lernantoj spertas partoprenante ludon, helpas malstreĉi la tiel nomatan lingvo-memon – la identecon, kiun homo disvolvas rilate al sia parolata lingvo (Guiora, 1994; Dörnyei, 2005). Ni esperas baldaŭ kundividi pli da gravaj kompreno pri tiu aspekto de lingvolernado.

Ni ankoraŭfoje dankas al Esperantic Studies Foundation, kiu ebligis la ludon kaj la ligitan esplorprojekton! Vizitu nin por ĝisdatigoj kaj novaj materialoj pri Esperanto.

Referencoj:

- ◆ Guiora, A. Z. (1994). The two faces of language ego. *Psychologica Belgica*, 34(2-3), 83–97.
- ◆ Dörnyei, Z. (2005). *The Psychology of the Language Learner: Individual Differences in Second Language Acquisition*. Lawrence Erlbaum Associates Publishers.

Aliaj interesaj legaĵoj pri la temo:

- ◆ Charles, T., Bustard, D., & Black, M. (2011). Experiences of promoting student engagement through game-enhanced learning. En *Serious games and edutainment applications* (pp. 425-445). Springer, Londono.
- ◆ Czikszentmihalyi, M. (1990). *Flow: The psychology of optimal experience*. Novjorko: Harper & Row.
- ◆ Koster, R. (2013). *Theory of fun for game design*. O'Reilly Media, Inc.
- ◆ Massart, F. (2016). *Level up!* https://docs.moodle.org/36/en/Level_up! (alirita la 14-an de januaro 2019).
- ◆ McGonigal, J. (2011). *Reality is broken: Why games make us better and how they can change the world*. Penguin Press.
- ◆ Prensky, M. R. (2010). *Teaching digital natives: Partnering for real learning*. Corwin Press.
- ◆ Sadler, R. W., & Nurmukhamedov, U. (2020). *New Ways in Teaching with Games*. TESOL Press.
- ◆ York, J., deHaan, J., & Hourdequin, P. (2019). It's your turn: EFL teaching and learning with tabletop games. En *Innovation in Language Teaching and Learning* (pp. 117-139). Palgrave Macmillan, Cham.

D-ino Vita Kogan estas Lekciisto pri Lingvoscienco ĉe la Universitato Queen Mary de Londono. Antaŭ ol transloĝiĝi al Britujo, ŝi servis kiel Asista Profesoro ĉe la Lingvoinstituto de la Departemento de Defendo kaj faris la kunordigon kaj instruadon de lingvokursoj ĉe la Instituto Middlebury pri Internaciaj Studoj, Kolegio Concordia, kaj la Universitato de Picburgo (Usono).

Stas Kapustin estas bildisto kaj fotisto laboranta pri granda amplekso da internaciaj projektoj, de vida reklamado ĝis ilustrado de libroj kaj fasonado de tabulludoj, kaj kunaŭtoro de la lingvolernaj tabulludoj LinguaPolis Novjorko kaj LinguaPolis Moskvo.

La historio de la Premio Vidyasagar

Probal Dasgupta

<https://esfconnected.org/2021/12/06/premio-vidyasagar/>

Prezenti al internacia publiko la fakton ke la ministerio pri supera eduko de la registaro de Okcidenta Bengallando (gubernio en Barato) aljuĝis al esperantisto “premion Vidyasagar”, en 2021, signifas interalie diri kelkajn vortojn pri la nur siaregione konata figuro Ishwar Chandra Vidyasagar (1820–1891). Li pionire agadis sur la terenoj de la popolklerigo, la lingvoplanado, la pontofarado inter la klasika kaj la moderna eduksferoj, kaj la antaŭenigo de la virinoj. Ekzistis intimaj ligoj inter liaj unuavide diversterenaj iniciatoj. Manke de taŭgaj prezentoj en la kutimaj retejoj, jen provo skizi liajn kontribuojn kaj tiujn interligojn.



La honora titolo *Vidya-sagar* (“klero-oceano”), aljuĝita al li en 1839 de la Sanskrita Kolegio en Kolkato, stampis lin kiel majstran klerulon pri la sanskrita gramatiko kaj la al ĝi ligitaj tradiciaj fakoj. Li tradukis (el la sanskrita, la angla, la hindia) plurajn klasikaĵojn en la bengalan, la ĉeflingvon de Bengallando; lia urbo Kolkato estis la ĉefurbo ne nur de tiu provinco, sed ankaŭ de la tuta Hindlando, tiutempe brita kolonio. Liaj tradukaĵoj instalas stabilan estetikan normon por la bengala prozo. Por taŭge presigi bengallingvajn verkojn, Vidyasagar dezajnis elegantan litertiparon. Li verkis abocojn – kiuj tuj furoris, kaj restis klasikaĵoj – por instrui tiustilan manskribon kaj krome por inici infanojn en konduadon taŭgan al laika kulturo kaj moderna jura sistemo.

Tiutempe ĝenerale la bengalaj familioj ne edukis siajn filinojn. Aldona problemo estis la multaj knabinoj kiuj fruaĝe edziniĝis kaj vidviniĝis. Vidyasagar fondis (kaj fondigis) multajn porknabinajn lernejojn. Por la pli specifa problemo, li kampanjis por ke la vidvinoj rajtu reedziniĝi. Tiucele li debatis kontraŭ ortodoksaj kleruloj, citante praklasikan leĝdonanton kiu dekretis ke la vidvinoj havu tiun rajton. Liaj kontraŭuloj verkis nur sanskrite. Vidyasagar refutis ilin ne nur tiulingve sed ankaŭ per spritaj pamfletoj bengallingvaj. Venkinte ilin kulture, li sukcesis instigi la kolonian registaron jure validigi la reedziniĝan rajton de la vidvinoj.

Dum li direktoris la Sanskritan Kolegion, Vidyasagar reformis la kursaron tiel ke la racia enhavo superpezis la teologian. Li verkis bengale lernolibrojn pri sanskrito kiuj glatis la lingvo-pedagogion. Per mono enspezita el lernolibro-vendoj li financis la socihelpajn kampanjojn, vivante senlukse, laŭeble anonimigante siajn mecenataĵojn.

Ekde 1980 la gubernia registaro en Kolkato ĉiujare aljuĝas Premion Vidyasagar al verkistoj por ilia dumviva kontribuo. Okaze de la ducentjara jubileo en 2020-21, oni almetis la nomon de lia edzino Dinamoyee kaj ligis la premion al ĉiuj terenoj en kiuj li signife intervenis. En 2021 ĝi estis aljuĝita al kvar personoj, pro agado lingva, beletra, kleriga, socireforma. La premion lingvan oni aljuĝis al Probal Dasgupta, menciante inter liaj kontribuoj ankaŭ la Esperantan agadon. Ĉi tiun reliefiĝon de Esperanto en la kultura pejzaĝo de Barato ebligis jardekoj da laboro fare de sennombraj movadanoj, ne nur en la lando mem. La Esperanta agado en Bengallando komencis elani antaŭ kelkaj jardekoj, kaj malrapide kreskas. Ni laboru kaj esperu.

Jarfina ESF-ĝisdatigo 2021

Chuck Mays

<https://esfconnected.org/2021/12/20/jarfina-2021/>

Esperantic Studies Foundation havis okupatan kaj produktivan jaron en 2021, malgraŭ la limigoj kaŭzitaj de la pandemio. En ĉi tiu afiŝo mi donos kelkajn elstarajojn de post la ĝisdatigo en julio.

La Usona Somera Esperanto-Programo (NASK) okazis virtuale denove en 2021 kun 68 partoprenantoj. La post-baza kurso estis instruita de veterana instruisto Hans Becklin. NASK bonvenigis Christophe Chazarein-Béa (Francio), kiu instruis la mezan kurson, kaj Tim Owen (Britio), kiu instruis la superan kurson, kiel unuafojajn instruistojn. La NASK-teamo prepariĝas por reveni al personaj klasoj en 2022 kaj planas interretan preparan kurson por tiuj, kiuj bezonas refreŝigon antaŭ NASK kaj antaŭ la universala kongreso en Montrealo en julio 2022.

Nova programo, Marjorie Boulton Fellowships, komenciĝis en 2021 kaj daŭros en 2022. Du stipendioj estis aljuĝitaj al junaj akademiuloj Guilherme Fians kaj Edwin Michielsen.

La esploroj de Fians baziĝas sur la temo de lia doktora disertacio: etnografia studo pri la Esperanto-movado en Francio. La esploroj celas kompreni, kiel lingvoj kaj ciferecaj komunikiloj havas efikon je la maniero, laŭ kiu homoj evoluigas kaj plukomunikas politikajn perspektivojn.

La stipendio ebligas al Michielsen plian viziton al la Universitato Waseda kaj al la Japana Esperanto-Instituto por esplori pri la frua historio de Esperanto en Japanio kaj Ĉinio, kaj precipe pri la maniero, laŭ kiu Esperanto estis utiligata de proletaj verkistoj en la unua duono de la dudeka jarcento por konstrui tutmondan lingvan solidarecon kontraŭ imperiaj lingvoj kaj lingva subpremo.

Nia ĉiujara estrara kunveno okazis virtuale por la dua jaro. En kvin sesioj en septembro kaj frua oktobro la estraro faris planojn por 2022 kaj poste. Unu rezulto estas la aldono de tri estraranoj: Paige Feldmann, advokato en privata praktiko en Raleigh, Nord-Karolino;

Profesoro Francis Hult de la Universitato de Maryland Baltimore County (UMBC); kaj Marcia Rego, Lektoro de la Praktiko de la Verkad-Programo Thompson ĉe la Universitato Duke. Tiuj talentaj aldonoj al la estraro plifortigas la jam spertajn kaj dinamikajn estraranojn, kiuj gvidas Esperantic Studies Foundation. Kun bedaŭro du estraranoj ne plu povas servi: Ben Speakmon, programaro-inĝeniero el Seatlo kaj Esther Schor, profesoro ĉe Princeton. ESF dankas ilin pro iliaj dediĉo kaj jaroj de servo.

Dankon pro via subteno al Esperantic Studies Foundation en 2021. Ni antaŭĝojas pri 2022 kaj esperas povi persone saluti vin en Montrealo.

Chuck Mays estas la Ĉefdirektoro de ESF.



Seeking linguistic
solutions to
global inequality
since 1968

BULTENO

Ni prezentas la Bultenon

<https://esfconnected.org/2021/11/26/introducing/>

Bonvenon al la Bulteno de ESF Connected, kolekto da koncizaj dulingvaj afiŝoj pri venontaj eventoj, lastatempaj eldonaĵoj kaj novaj projektoj rilataj al ESF, interlingvistiko kaj lingva justeco. Tiaj artikoloj formis grandan parton de la enhavo de nia trimonata cirkulero [Informilo por Interlingvistoj](#) dum la pasintaj du jaroj, kaj ankoraŭ tiel estos, sed ili nun aperos ĉe [ESF Connected](#) unue.

Ĉiu ero en la Bulteno enhavas mallongan tekston kaj en la angla kaj en Esperanto, ofte kun ligilo al pliaj detaloj en la reto. Liveras la informojn Luis Obando kaj Angela Tellier, kaj ilin tradukas kaj pretigas por la blogo Simon Davies. Koran dankon al Angela pro ŝia laboro pri ESF Connected ekde ĝia estiĝo antaŭ iomete pli ol unu jaro!

Retinario en Mazandarano

<https://esfconnected.org/2021/11/27/webinar-mazandaran/>

Tre lastatempe okazis la 2-a Retinario pri Esperanto en la Universitato de Mazandarano (Irano) por prezentado de Esperanto al la ekstera publiko. La uzataj lingvoj estis Esperanto kaj la persa (kaj foje la angla), kun tradukado. Eblas [spekti ĝin en Jutubo](#) (daŭro: 4 horoj kaj 15 minutoj).

Serĉata: Tradukisto de historia studo

<https://esfconnected.org/2021/11/29/wanted-translator/>

Preskaŭ finverkita estas historia studo pri du gravaj esperantistaj aktivuloj (japana kaj bulgara), kiuj estis samtempe konvinkitaj komunistoj. La studo, ĉ. 9000-vorta, prilumas iliajn vivovojojn en la komunista kaj Esperanto-movadoj, inkl. ilian reagon al la falo de socialistaj sistemoj. ESF aprobis subvencion de 800 eŭroj (ĉ. 900 usonaj dolaroj) por subteni tradukadon de la manuskripto al la angla por publikigo en faka revuo (en speciala temnumero pri Esperanto kaj ideologioj).

Kvalifikoj: pruvita kompetento pri anglalingva verkado je universitata nivelo (ne nepre pri historio); baza klereco pri la historio kaj politiko de la 20-a jarcento; bonega legkapablo en Esperanto. Antaŭa sperto pri faka tradukado estus bona. La traduko estas bezonata ĝis la 1-a de marto 2022.

Bonvolu sendi kandidatiĝan leteron al la respondeca ESF-estrarano Mark Fettes, mtfettes@sfu.ca.

Un siècle d'espérantisme ouvrier

<https://esfconnected.org/2021/12/01/siecle-ouvrier/>

La 17-an de decembro, okaze de la centjariĝo de Sennacieca Asocio Tutmonda, okazis studtago "Un siècle d'espérantisme ouvrier" en Parizo ĉe Campus Condorcet. Lingvoj estis franca, angla kaj Esperanto. Ĝin konkludis memprezentoj de aktualaj aktivuloj, ĝenerala diskuto kaj amika aperitivo.

Jen [pliaj informoj](#), inkluzive la programon.

Gesellschaft für Interlinguistik 2021

<https://esfconnected.org/2021/12/02/gil-2021/>

Sabine Fiedler informas nin, ke aperis la jarlibro de Gesellschaft für Interlinguistik 2021. La artikoloj estas verkitaj en la germana. Estas krome [reta versio](#) de la libro, kun la enhavtabelo kaj elŝuteblaj PDF-dosieroj de la artikoloj. Ĉiun artikolon akompanas resumo en Esperanto kaj la angla.

François Grin ĉe Svisa Romanda Radio

<https://esfconnected.org/2021/12/03/francois-grin/>

“Estas bezonataj 12 000 ĝis 15 000 horoj por lerni la anglan lingvon kaj praktiki ĝin en bona nivelo. Neniu ŝtato sukcesas konstrui tian studon en sia instruprogramo.” Jen aserto de François Grin, membro de la ESF-konsilantaro, merkrede la 10-an de novembro 2021 ĉe Svisa Romanda Radio en la elsendo [Forum](#) (en la franca).

Ilona Koutny prelegos dum BET-56

<https://esfconnected.org/2021/12/07/koutny-bet-56/>

Dum la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (9–17 de julio 2022 en la litova havenurbo Klaipėda), prof. Koutny prezentos kvin prelegojn:

- ◆ “Esperanto inter la naturaj lingvoj” traktos diferencojn inter planitaj kaj naturaj lingvoj, poste prezentos la esperantajn sistemon, gramatikon kaj leksikon en komparo kun etnaj

lingvoj surbaze de granda datumbazo, kaj esploros, kiomgrade Esperanto estas lingvo averaĝa kaj eŭropa.

- ◆ “Etapoj de la evoluo de Esperanto” prezentos la evoluon de la lingvo Esperanto en kvin etapoj kun ĝiaj gravaj dokumentoj.
- ◆ “La obstinaj radikoj” traktos la problemon de vortfarado kaj analizos la problemon, ĉu ekzistas radikkaraktero en Esperanto.
- ◆ “Verboj en la centro” diskutos la rolon de verboj el diversaj flankoj (sintaksa kaj semantika).
- ◆ “Esperanta vortoprovizo kaj ĝia evoluo” traktos la rilatojn en la vortoprovizo kaj analizos la manieron alpreni novajn radikojn.

La tradukado, Esperanto kaj la lingvopolitiko

<https://esfconnected.org/2021/12/08/translation-esperanto-politics/>

Giridhar Rao faris interesan anglalingvan prelegon al neesperantista publiko en Barato, ĉe la Nacia Traduk-Misio (NTM) en septembro 2021: [La tradukado, Esperanto kaj la lingvopolitiko](#).

Kiu estis Atanasov?

<https://esfconnected.org/2021/12/10/atanasov/>

Dum siaj lastaj esploroj pri la interlingvistika agado de Rudolf Carnap, Baŝak Araj sukcesis trovi la nomon de la bulgara esperantisto kaj studenta aktivisto, kun kiu li amikiĝis dum kaj post la 1922-a kongreso de Helsingfors. Li nomiĝis [Atanas D. Atanasov](#), sed nur mallonga informo pri li troveblas surrete. Ĉu vi havas liajn verkojn kaj/aŭ pli ampleksan informon pri li? Ni jam scias pri la libro *La lingva esenco de Esperanto*.

Komentis Ulrich Lins:

Estas du esperantistoj kun la nomo Atanas D. Atanasov. La amiko de Carnap vivis de 1897 ĝis 1957. Li estis agronomo, studis en Halle kaj doktoriĝis en Parizo. La alia, pli fama, vivis de 1892 ĝis 1981.

Efiko de interkulturaj edukaj interŝanĝoj

<https://esfconnected.org/2021/12/13/intercultural/>

Lastatempa eldonaĵo taksas la efikon de edukaj interŝanĝoj kaj eksterlandaj studprogramoj. La verko, titolita [Interkultura komunika kapablo en eduka interŝanĝo: multnacia perspektivo](#), baziĝas sur du ampleksaj esplorprojektoj, kiuj ekzamenis la naturon de interkultura komunika kapablo (IKK), ĝian disvolviĝon dum interkulturaj interŝanĝoj (someraj, mallongedaŭraj kaj semestraj programoj) kaj la efikon de tiuj spertoj al la vivoj kaj de studentoj kaj de gastigantoj ĝis 20 jarojn poste.

Farata de la Federacio de la Eksperimento pri Internacia Vivado en ok landoj – Brazilo, Ekvadoro, Germanio, Britio, Irlando, Japanio, Svisio kaj Usono – la esploroj partoprenigis pli ol 2000 studentojn kaj pli ol 200 gastigajn familiojn, esplorante la gravecon de interŝanĝaj spertoj al la transformado de homaj vivoj. Bazita kaj sur kvanta statistiko kaj kvalita rakontado, la studo identigas ankaŭ programerojn, kiuj plej antaŭenigas interkulturan disvolviĝon, emfazante loĝojn ĉe gastigaj familioj kaj kapablon pri la gastiga lingvo kiel plej gravajn.

Ĉi tiu grava kontribuo de **d-ro Alvino E Fantini**, Emerita Profesoro, Postdiploma Instituto SIT, al la interkultura komunika literaturo bazas sian multnacian perspektivon sur vasta literatura serĉo en ses lingvoj etendiĝanta tra 50 jaroj por identigi multoblajn konstrupartojn de IKK, por evoluigi ampleksajn taksilojn kaj por taksi la disvolviĝon de IKK kaj ĝian efikon al interŝanĝiĝantoj.

Konstrui komunumon per gastamo

<https://esfconnected.org/2021/12/16/community-hospitality/>

Antropologoj ĉefe ĉerpas el la teoria supozo, ke la interagaj kutimoj subkuŝantaj gastamon estas parencaj al tiuj de donacado. Tamen, enfokusigante la donadon kaj ricevadon de gastamo, tia studado malsukcesis pritrakti la trian elementon de tiuj interŝanĝoj: reciprokado. Fronte al tio, ĉi tiu lastatempa anglalingva artikolo de Guilherme Fians, “**Konstrui komunumon per gastamo: Nerektaj devigoj reciproki en transnacia parolkomunumo**”, konsideras vojaĝadon inter Esperanto-parolantoj en Francio, celante kompreni kiel gastamo graviĝas por igi homojn plene maturiĝintaj Esperanto-parolantoj per la emfazo de interkulturaj, plurlingvaj kaj translandlimaj interŝanĝoj.

Reguligi la regulan

<https://esfconnected.org/2021/12/17/regularizing/>

Ĉi tiu interesege anglalingva artikolo – “**Reguligi la regulan: La fenomeno de troreguligo en Esperanto-parolantaj infanoj**” de Renato Corsetti, Maria Antonietta Pinto kaj Maria Tolomeo, eldonita en *Language Problems and Language Planning* en 2004, pritraktas la fenomenon de troreguligo en Esperanto, lingvo jam ege regula, en infanoj, kiuj ĝin lernas kiel sian denaskan lingvon kune kun unu-du aliaj naciaj lingvoj. Ĝi konsistas el analizo de la taglibroj skribataj de Esperanto-parolantaj gepatroj, sekvantaj la disvolviĝon de kvin infanoj, kiuj kreskis parolante Esperanton kiel unu el siaj unuaj lingvoj.

Lingva justeco ĉe IKIKO

<https://esfconnected.org/2021/12/18/ikiko/>

La rete okazinta Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado (IKIKO) enhavis interalie aron da programeroj (en la hispana) pri lingva justeco. Oni poste publikigos aŭ diskonigos la resumojn en Esperanto.

Avo Grabowski

<https://esfconnected.org/2021/12/21/grandpa-grabowski/>

Ĉapitro 1 de Z. Anthony Kruszewski in *Wartime Europe and Postwar America*, anglalingva biografio de Beata Halicka en 2021 pri grava intelektulo en la pola-usona komunumo, komenciĝas per sekcio titolita “Avo Grabowski – la unua Esperanta poeto”. Zbigniew Kruszewski prenis sian mezan nomon honore al sia avo kaj Esperanto-pioniro Antoni Grabowski.

Esperanto-historio en Katalunio

<https://esfconnected.org/2021/12/22/catalonia/>

Antaŭ unu jaro Javier Alcalde publikigis artikolon (en la itala) pri la historio de la Esperanto-movado en Katalunio en itala faka revuo pri la historio de sociaj movadoj. Nun ĝi [legeblas rete](#). Fakte la [tuta numero](#) povas interesi al niaj itallingvaj legantoj, ĉar temas pri konfliktoj rilate al lingvoj.

REDAKTORE

- ◆ Salvatore Corasaniti, Alessandro Pes kaj Alessandro Stoppoloni, “La lingvo batas kie la dento doloras”

ZOOM

- ◆ Luca Des Dorides, “Sen vortoj: Signolingvoj kaj socia konflikto”
- ◆ Ettore Asoni, “Inter spaco kaj vortoj: Raso kaj lingvo en la norma usona angla”
- ◆ Ester Cois, “Ordo estas deco: Diskursaj registroj kaj aranĝopraktikoj en urba spaco”

BILDOJ

- ◆ Alessia Masini, “Ĉi tio estas punko, ne muziko!”

FENDOJ

- ◆ Angelica Pesarini kaj Guido Tintori, “La gramatiko de raso: identeco kaj civitaneco”
- ◆ Javier Alcalde, “Maro estas gutaro: Historio de la Esperanto-movado en Katalunio”

- ◆ Alessandra Castellani, “Nigra kaj griza: Chicani-tatuoj kaj urbopartokulturoj”

HISTORIO EN LA LABORO

- ◆ Francesca Socrate, “La lingvistiko de korpusoj: Lingvo kaj konflikto”

COMICZ

- ◆ Andromalis, “Cut up for dummies: Malgranda manlibro de lingva konflikto”

VOĈOJ

- ◆ Virinoj en Tradukado, “Feminisma traduko: la poemoj de Audre Lorde” (redaktita de Giulia de Rocco)
- ◆ Sandro Gobetti, “X: Malkovri la nekonataĵojn en la paĝoj de *Infoxo*” (redaktita de Giovanni Pietrangeli)

ALIAJ RAKONTOJ

- ◆ Luca Peretti, “Ciak, silenton, oni filmu!: Kelkaj notoj pri kino kaj konflikto”
- ◆ Alessandro Pes, “Kiel la filmoj formas socion: Filmoj kaj televidserioj en la epoko post Obama”

LOKOJ

- ◆ Projekto “San Basilio, Storie de Roma”, “Inkvizicio de la 21-a jarcento: Apero (kaj malaperoj) en la urbeto”

INTERVENOJ

- ◆ Christian De Vito, “Scio kaj povo: La lingvoj de la akademio”

Registritaj IKIKO-sesioj

<https://esfconnected.org/2021/12/27/ikiko-sessions/>

Lastatempe virtuale okazis la Dua Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado (IKIKO). Jen la registraĵoj de la sesioj:

- ◆ 17-a de decembro
- ◆ 18-a de decembro
- ◆ 19-a de decembro

Esperanto? Kiu lingvo estas tiu?

<https://esfconnected.org/2021/12/29/esperanto-what/>

Jen la **doktoriĝa disertaĵo** de la brazila lingvistino Andréa Marques Rosa Eduardo. Andréa ĵus doktoriĝis pri Lingvoj en la Federacia Universitato de Mato Grosso do Sul per disertaĵo, kiu esploras Esperanton laŭ diskursanaliza aliro. Esence ŝia disertaĵo temas pri analizo de la diskursoj de Zamenhof, kaj kiel ili kontribuas (aŭ ne) al la akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo.

Andréa faris sian esploron surbaze de la portugala-lingvaj tradukoj de la diskursoj de Zamenhof, kaj nuntempe ŝi ellernas Esperanton por baldaŭ daŭrigi ŝiajn Esperanto-rilatajn esplorojn.

Reguloj kaj motivigoj – simpozio

<https://esfconnected.org/2021/12/30/rules-incentives/>

REAL (esplorgrupo “Ekonomiko, politik-analizo kaj lingvo”) organizos interfakan simpozion je la 16-a kaj 17-a de junio 2022 ĉe **Andrássy-Universitát**, Budapeŝto kaj **Nemzeti Közszerológálati Egyetem Ludovika** (Universitato de Publika Servo), Budapeŝto.

Oni invitas referaĵojn pri la ĝenerala temo de la simpozio “Reguloj kaj motivigoj en lingvaj politiko kaj planado: Ekonomikaj, juraj kaj sociolingvistikaj aliroj”. Pliaj detaloj disponeblas **jen**.

Abibifahodie! Lingvo, konscio kaj malkoloniigo

<https://esfconnected.org/2021/12/31/abibifahodie/>

Esperanto estas diskutita en piednoto en **jena eseo** de Kamau Rashid de la Universitato de Nordorienta Ilinojso, eldonita en la oktobra numero de *Moja*, interfaka revuo pri afrikajaj studoj.

“Lingvo, krom sia utileco kiel perilo de komunikado, portas ankaŭ signifon de politika kaj ekonomia potenco. Ĝi estas ankaŭ, eble plej grave, esprimkapabla instrumento de popola mondrigardo. Tiel, dum afrikanoj batalis kaj ankoraŭ batalas por memdecido en la mondo, ili ofte suferas daŭran dependecon de la lingvoj mem de tiuj popoloj, kiuj estas la arkitektoj kaj intendantoj de la sistemo oponanta tiajn liberigajn celojn. Ĉi tiu eseo provas ekzameni la intersekcojn de lingvo kaj malkoloniigo rilate al afrikaj homoj. Ĝi prezentas kritikan ekzamenon pri pluraj notindaj proponoj kaj provas klarigi la nemalhaveblecon de lingvo kiel kerna elemento en la kontestata tereno de afrika konscio.”

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. La enhavo de ambaŭ kutime aperas pli frue en la blogo [ESF Connected](#). Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org aŭ contact@esfconnect.org. Limdato por la venonta numero: 31-a de marto 2021. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj.

ESF en la reto: www.esperantic.org, esfacademic.org, esfconnected.org, interlingvistiko.net, www.facebook.com/esperantic. Tvitero: [@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf), [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic).

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>